etoso estis preskaŭ konstanta elemento de la unua etapo de la Esperanta movado, t.e. ĝis la jaro 1914, kiam komenciĝis la Unua Mondmilito.

La tiama reĝo de Hispanio, Alfonso la 13a, avo de la nuna monarĥo de nia lando, akceptis prezidi la patronecon de la kongreso. La registaroj de Belgujo, Meksikio, Norvegujo kaj Usono sendis reprezentantojn al tiu esperantista evento de Barcelono. La urbestro de tiu urbo donacis gravan monsumon, kaj la Rektoro de la Universitato permesis uzi la palacojn de tiu institucio por la kongresaj sesioj. Post la alveno de Zamenhof al Barcelono, la 4an de septembro, li vizitis la aŭtoritatulojn de la urbo akompanata de la Loka Kongresa Komitato kaj iuj akademianoj. La sekvantaro okupis kvar veturilojn kiujn gvidis rajdantaj urbogardistoj, kaj dum la irado tra la stratoj ili estis simpatie salutataj de multenombraj gecivitanoj. La gekongresanoj, kaj landaj kaj eksterlandaj, spertis grandan ĝojon kaj iluzion.

La kongreso daŭris dum la tagoj 5a al 11a de septembro en festa etoso. Esperantaj flagoj ornamis multajn balkonojn en la urbo. En la esperantista meso de la dimanĉon, 5an de septembro, la predikanta pastro Richardson benis la esperantistaron nome de la Papo. Dum la kongresaj tagoj abundis la signoj de socia akcepto de la esperantismo. Ni citas jenan paragrafon de la Analoj:


> Se dimanĉo aperis multaj balkonoj ornamitaj de tapetoj kaj Esperantaj flagoj, lundo, la tuta Barcelono estis plene esperantigita. Tia estis la impreso de partopreninto en tiu kongreso, kaj iu aldonis: kafejoj, tramveturiloj, balkonoj, vendejoj, ĉie oni vidis Esperantaĵojn, ĉie oni kantetis nian himnon, la utopio pri Esperantujo fariĝis realo en tiuj kongrestagoj, ĉar Esperanto vere sinjoris la urbon, malofte oni povis konstati tiom da fervoro kaj entuziasmo surstrate...

Zamenhof prezidis la kongresajn sesiojn kaj siaj tiamaj diskursoj esprimis optimismon kaj fidon pri la estonteco. Fine de la kongreso, Ricardo Codorniu, la patro de la hispana esperantismo, komunikis ke la Reĝo de Hispanio nomis Doktoron Zamenhof Komandoro de la ordeno de Izabela la Katolika. Eble la Majstro Zamenhof travivis tiam la plej feliĉajn tagojn de sia vivo. Li povis pensi ke alvenis la tago de lia triumfo, la venko de la utopio. Tiu protokola ordeno, kiun li ricevis, povis ŝajni signo de historia revanĉo aŭ kompenso: Izabela la Katolika estis reĝino kiu, antaŭ kelkaj jarcentoj, elpelis la judojn el Hispanio, kaj jen tiam, judo triumfe akceptata en la lando ricevas la honoron de Komandoro de ŝia ordeno.

Post la barcelonaj kongrestagoj estis kelktaga postkongresa ekskurso al Valencio. Tie la popola simpatio al Esperanto kaj ties kreinto estis eĉ pli varma ol en Barcelono. Recitante la Analoj-n:

> Je la emocia momento de la eniro de la trajno en la stacidomon tondra entuziasma aplaŭdado sonis, dum la urba muzikbando ludis "la Espero"-n kiun ĥore kantis la alvenintoj kun la atendintoj... Dum la marŝado de la veturiloj tra la Valenciaj stratoj, la publiko varme aplaŭdadis, multaj personoj sin elŝovis el la balkonoj por vidi la eminentan invititon, kaj, kiam la veturilo de Zamenhof trafis la hotelon Palace kie devis loĝi la aspekto de strato Paz kaj la publikaklamoj estis vere imponaj. Nia Majstro eniris en la hotelon sed la aplaŭdoj tute ne ĉesis, kio devigis lin sin montri al la publiko en la balkono por danki tiel grandajn pruvojn de simpatio kaj akcepti ankoraŭ novajn aklamojn.

Vere, Zamenhof povis pensi ke alvenis la Tempo de la Mesio, kiam malaperos ĉiu homa kontraŭdiro kaj regos feliĉo. Sed konvenas klarigi ke en tiu esperantista optimismo estis multe da subjektivismo. La realo estis multe pli akra ol montris tiuj brilaj tagoj. Hispanio estis tre malriĉa, preskaŭ duonfeŭda lando kiu, krome, tiam havis koloniisman militon en Maroko. Ĝuste du monatojn antaŭ la kongreso en Barcelono, en tiu sama urbo estis perforta revolucio kontraŭ la milito, la Reĝo kaj la burĝaro, la t.n. "Tragika Semajno", kiu endanĝerigis la okazadon de la kongreso.



Fotoj de la universala kongreso de Esperanto en Barcelono, en 1909, kun la ĉeesto de Zamenhof.